**Printempo**
**2001**
**(2)**
**Apr. - maj. - jun.**

La *Vocho de Amikejo*
iama gazeto de Neuxtrala Moresneto, oficiala informilo de

# Senlime

Esperanto-Asocio en Euxregiono Mozo-Rejno

En cas de non distribution, renvoyer à:
S-ro Heinrich **Lentzen**,
Feldweg 20
B 4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-554326
Mail: lentzenh@gmx.net

## Enhavo :

2. La ekonomia kresko de Liegxo
3. La croissance économique de Liège
4. Euregiona kalendaro
5. Jara agadraporto
6. Verviersa angulo

**E**ldonita de **V**erviersa **E**speranto-**G**rupo kaj ***Senlime***, kunlabore kun la **M**inisterio pri franclingva **K**omunumo en **B**elgio.

# *Senlime* invitas vin al TRILANDA RENKONTIGxO EN METALURGIA DOMEGO (LIEGxO)

dimancxon, la 23-an de septembro 2001



## La Valonia forgxejo de la metalurgia domego

Bazita sur la temo "industria arkeologio", la domego pri metalurgio en Liegxo enhavas interalie tiun tipe Valonian forgxejon el la 18-a jarcento. Malnovaj masxinoj, ilaroj kaj bildaroj prezentas la historion de metalurgio kaj karba ekspluatado en la Liegxa baseno.

Tiu-cxi informilo senpage konsulteblas kaj kopieblas el niaj ret-pagxoj je la URL: http://www.ping.be/jmjsenlime
H. Lentzen prizorgas surpaperigon kaj sendadon nur al la kotizintaj membroj. La belgaj valonoj, membroj de APE, ricevas la informilon ene de "Inter Ni".

**Editeur responsable / Responsa eldonanto (franclingva):**
GSM +32-486-947.957
Mail: JMJacques@galaxycorp.com
J.-M. Jacques, Pl. Verte 23 bte 3,
B-4800 VERVIERS
**Informatie in het Nederlands / Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-43-3062015
Mail: sinno@ibac.rwth-aachen.de
T. Sinno, In 't Oord 45
NL-6291 VN VAALS
**Informationen auf deutsch / Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@t-online.de
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
D-52134 HERZOGENRATH

**Jara abono / aligxo : 10 EUR**
**Belgio** : konto 000-0245571-64
Esperanto-Grupo, rue Donckier 22,
B-4800 VERVIERS
**Nederlando** : konto 57 89 43
Senlime, Rothenbachpark 44
6063 NM Vlodrop
**Germanio** : konto 6623201,
Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000)
Im Pesch 20
D-52134 HERZOGENRATH

Enmergigxu kun ***Senlime*** en la historion de

# la ekonomia kresko de Liegxo

Naskigxinta kunflueje de Mozo [Meuse], Urto [Ourthe] kaj Legxino [Legia], rivereto hodiaux tute subtera, la urbo Liegxo limigxis, en la 2-a. jarcento, je la bieno de romia vilao kies fundamentoj estis malkovritaj sub la nuna placo Sankta Lamberto.

Vera domgrupo arigxis tie nur en la 8-a. jarcento. Tiuepoke, sankta Huberto starigis bazilikon tie kie lia antauxulo, sankta Lamberto, episkopo de Maastricht, estis murdita. Tiel farigxinte religia centro, la urbo poste allogis metiistojn kaj komercistojn.

Sub la princepiskopo Notger, ekpotencigxinta en 972, Liegxo konis unuan prosperan epokon. La princepiskopejo estis rapide kovronta surfacon egalan al duono de la nuna Belgio. La historio de Liegxo evidente ligigxas grandparte al tiu de la princepiskopejo.

Dank'al la ekstraktado de la minkarbo, malkovrita en la 12-a. jarcento, multaj forgxistoj aktivadis en Liegxo jam ek de la 14-a. jarcento. Dum la 12-a. jarcento, la religia potenco duobligxis de civila potenco, kiu flegis la interesojn de la civito kaj konservis sian auxtoritaton - ne sen kelkaj difektoj - gxis la fino de la Mezepoko.

La urbo estis ruinigita kaj rabita sinsekve de Henriko la 1-a. el Brabanto (1213), Johano la Sentimulo (1408) kaj Karlo la Troriskemulo (1468).

Liegxo estis kononta duan luksan periodon sub Erard de la Marck, princepiskopo de 1505 gxis 1538. En 1789, la Liegxa revolucio eksplodas. Gxi malsukcesas pro malsamaj interesoj de gxiaj aktoroj.

Sed, alvene de la Franciaj trupoj en 1792, la Liegxanoj montrigxis ardaj anoj de la juna respubliko, fervortroige detruante sian propran katedralon : la Liegxa princepiskopejo estis aneksita al Francio kaj igxis la Urta departemento.

En 1815, post la definitiva malvenko de Napoleono en Waterloo, la iama princepiskopejo Liegxa estas integrita al la Nederlanda regxlando, kies regxo, Vilhelmo de Orange-Nassau, nekapabla delegi sian povon kaj kunlabori kun aliaj, cxiam restos solulo malfacile alproksimebla.

Li tamen kondukos en sia regxlando politikon ekonomian kaj socian nekontesteble favoran al niaj regionoj. Li enkondukigis novajn metodojn en la ferindustrio de la sulko Sambro-kaj-Mozo kiu, jxus antaux 1830, estis farigxinta la dua industria regiono en la mondo, tuj post Anglujo.

Por vigligi la industrion, li fondis en 1822, la Gxeneralan Societon de Nederlando, investbanko kiu naskis nian Gxeneralan Societon. Malfelicxe, la ekonomia bonstato kiu rezultis de tio profitis precipe al la posedanta burgxaro...

En la 19-a. jarcento, retrovinta la bonstaton, Liegxo estos la unua centro pri manfabriko de armiloj en Belgio. Jam ek de 1830, igxinta post la revolucio la cxefloko de la belgia provinco kiu portos gxian nomon, gxi konis fortan demografian kreskon kaj grandan industrian vervon, favorigitan pro gxia situo sur granda sxipirebla vojo kaj sur ricxa minkarba baseno.

La angla industriisto John Cockerill elektis la Liegxan basenon por disvolvi siajn agadojn : fornegoj kaj pezaj industrioj sin instalas borde de Mozo.

Oni tie konstruas la unuan Euxropan lokomotivon kaj oni tie eksperimentas la Bessemer-an procedon por sxtala fabrikado. La Nacia Fabriko de Armiloj en Hestal estas fondita en 1889.

La industria kresko estas interrompita de la du mondmilitoj kiuj senkompate frapas la urbon. Nur dum la milito 1940-1945, cxirkaux 23.000 logxejoj estis detruitaj per flugantaj bomboj (V1 kaj V2).

Tamen la kreo de la Albert-a kanalo (1939) interkomunikiganta Mozon kaj Skeldron ebligis al Liegxo igxi la tria nemarborda haveno en Euxropo. Petrola haveno estis tauxgarangxita inter 1951 kaj 1964.

Tiuepoke, la prilaborado de metaloj restis la cxefa aktivado en Liegxo : siderurgio (40 % de la Belgia sxtalo), peza kaj transformiga metalurgio, pritraktado de neferaj metaloj, interalie zinko (Seraing). Ankaux citindas la kemia industrio, la vitroarto (Val St-Lambert), la cimentejoj kaj la kauxcxukaj manfarejoj.

Dum la lastaj jardekoj, la industria baseno Liegxa montris, kiel multaj aliaj, netan malkreskigxon. Tamen, gxia rekonverto estos plifaciligata pro gxia situo proksima al Germanio kaj Nederlando. Liegxo hodiaux forgxigxas Euxropan markbildon kaj flegas kun gxiaj proksimaj najbaroj, Maastricht kaj Aachen, promesplenan disvolvpoluson.

Replongez vous avec ***Senlime*** dans l'histoire de

# l'essor économique de Liège

Née au confluent de la Meuse, de l'Ourthe et de la Légia, petite rivière aujourd'hui totalement souterraine, la ville de Liège se limitait, au 2e. siècle, au domaine d'une villa romaine dont les fondations furent découvertes sous l'actuelle place Saint-Lambert.

Une véritable agglomération ne s'y constitua qu'au cours du 8e. siècle. A cette époque, saint Hubert fit ériger une basilique à l'endroit où son prédécesseur, saint Lambert, évêque de Maastricht, avait été assassiné. Devenue ainsi un centre religieux, la ville attira par la suite des artisans et des marchands.

Sous le prince-évêque Notger, arrivé au pouvoir en 972, Liège connut une première époque de prospérité. La principauté allait rapidement couvrir une superficie égale à la moitié de la Belgique actuelle. L'histoire de Liège est évidemment liée en grande partie à celle de la principauté.

Grâce à l'extraction de la houille, découverte au 12e. siècle, de nombreux forgerons ont exercé leur activité à Liège dès le 14e. siècle. Au cours du 12e. siècle, le pouvoir religieux se vit doublé d'un pouvoir civil, qui prit à coeur les intérêts de la cité et maintint son autorité - non sans quelques vicissitudes - jusqu'à la fin du Moyen Âge.

La ville fut dévastée et pillée successivement par Henri 1er de Brabant (1213), Jean sans Peur (1408) et Charles le Téméraire (1468).

Liège allait connaître une deuxième période faste sous Erard de la Marck, prince-évêque de 1505 à 1538. En 1789, la révolution liégeoise éclate. Elle échoue en raison des divergences d'intérêt de ses acteurs.

Mais, à l'arrivée des troupes françaises en 1792, les Liègeois se montreront d'ardents partisans de la jeune république, poussant le zèle jusqu'à détruire leur propre cathédrale : la principauté de Liège fut rattachée à la France et devint le département de l'Ourthe.

En 1815, après la défaite définitive de Napoléon à Waterloo, l'ancienne principauté de Liège se voit intégrée au royaume des Pays-Bas, dont le roi, Guillaume d'Orange-Nassau, incapable de déléguer ses pouvoirs et de travailler avec d'autres, restera toujours un solitaire, d'un abord difficile.

Il mènera pourtant dans son royaume une politique économique et sociale indubitablement profitable à nos régions. Il fit introduire de nouvelles méthodes dans la sidérurgie du sillon Sambre-et-Meuse qui, juste avant 1830, était ainsi devenue la deuxième région industrielle du monde, juste après l'Angleterre.

Pour stimuler l'industrie, il fonda en 1822, la Société Générale des Pays-bas pour favoriser l'industrie nationale, une banque d'investissements d'où naquit notre Société Générale. Malheureusement, le bien-être économique qui en résulta profita surtout à la bourgeoisie possédante...

Au 19e. siècle, le bien-être retrouvé, Liège sera le principal centre de manufacture d'armes de Belgique. Dès 1830, devenue après la révolution le chef-lieu de la province belge qui portera son nom, elle connut une forte croissance démographique et un grand essor industriel, favorisé par sa situation sur une grande voie navigable et sur un riche bassin houiller.

L'industriel anglais John Cockerill choisit le bassin liègeois pour développer ses activités : hauts fourneaux et industries lourdes s'installent sur les bords de la Meuse.

On y construit la première locomotive européenne et on y expérimente le procédé Bessemer de fabrication de l'acier. La Fabrique Nationale d'Armes de Herstal est fondée en 1889.

L'essor industriel est interrompu par les deux guerres mondiales qui touchent durement la ville. Au cours de la seule guerre 1940-1945, quelque 23.000 habitations furent détruites par les bombes volantes (V1 et V2).

Cependant la création du canal Albert (1939) reliant la Meuse à l'Escaut a permis à Liège de devenir le troisième port intérieur d'Europe. Un port pétrolier a été aménagé entre 1951 et 1964.

A cette époque, le travail des métaux restait la principale activité de Liège : sidérurgie (40 % de l'acier belge), métallurgie lourde et de transformation, traitement des métaux non ferreux, notamment du zinc (Seraing). Sont à citer également l'industrie chimique, la verrerie (Val St-Lambert), les cimenteries et les manufactures de caoutchouc.


Au cours de ces dernières décennies, le bassin industriel liégeois a accusé, comme beaucoup d'autres, un net déclin. Toutefois, sa reconversion sera facilitée par sa position proche de l'Allemagne et des Pays-Bas. Liège se forge aujourd'hui une image de marque européenne et entretient avec ses proches voisines, Maastricht et Aix-la-Chapelle, un pôle de développement prometteur.

La komunaj kunvenoj de la grupoj de Senlime principe okazas cxiun trian vendredon de monato (krom vintre kaj ferie) en Kelmis (Belgio, kultur-centro "Select", Lütticherstr. 264).

# Euxregiona kalendaro 2000/2001 (4)

Celante plifortigi la interpopolan interkomprenigxon, helpe de la internacia lingvo esperanto, precipe en la Euxregiono Mozo-Rejno, ***Senlime*** publikigas, por siaj kotizintaj membroj, agendon pri la esperanto-arangxoj en la Euxregiono.

Gxi eventuale povas enhavi la programerojn de la lokaj grupoj aux aktivajxojn organizitajn aux subtenitajn de komitatanoj. Gxi neniel igxu kompleta kalendaro de esperanto-arangxoj (aliaj ekzistas).




Vendredon, la 18-an de majo 2001 - Kelmis (B) : prelego de Klaus HOGEN pri "Kriptologio".
Inf.: Klaus J. HOGEN
Tel. xx 49 (0)2403 / 921949
E-mail: hogen@t-online.de

Vendredon, la 15-an de junio 2001 - 20h00 - Kelmis (B): prelego de Anelies SOUREN pri "La arkitekto Hundertwasser".
Inf. Trude SINNO
Tel. xx 31 4330/62015
E-mail: sinno@ibac.rwth-aachen.de



Dimancxon, la 30-an de junio 2001 - 9h30 - Maillen (B) : tradicia tago de APE (en kastelo Ronchinne).
Inf. Marcel DELFORGE
Tel. xx 32 (0)71 / 43.14.13
E-mail: mardelforge@busmail.net



Vendredon, la 21-an de septembro 2001 - Kelmis (B) : prelego de Raymond DEMARCHE ("Mi deziregis vidi Butanon kaj mi vidis Butanon" - 2/2).
Inf. Jean-Marie JACQUES:
Tel. +32-486-947.957
E-mail: jmjacques@galaxycorp.com



Dimancxon, la 23-an de septembro 2001 - Trilanda Renkontigxo en Metalurgia domego - Liegxo (B).
Inf. Jean-Marie JACQUES:
Tel. +32-486-947.957
E-mail: jmjacques@galaxycorp.com

!

**Pro eblaj program-sxangxoj, prefere telefonu cxe la menciita persono antaux ol partopreni aktivajxon.**

# Senlime : Komitata agadraporto 2000

## DIMANCxOn, la 23-an de septembro

Kulturdomo de Grivegnee (Liege)

**Membraro:**

Nia membraro konsistas el dudeko da Belgiaj membroj, deko da Nederlandanoj kaj deko da Germanoj.Tiu malbona ekvilibro parte sxuldigxas al la geografia situo de nia Euxregiono.

La komitato de ***Senlime*** tamen volus plikreskigi la nombron da membroj en Nederlando kaj Germanio. Tiucele eblus, okaze de statut-sxangxoj, akcepti membrojn ne-Euxropajn (la obstaklo estis la posxtaj kostoj, nun malpli gravaj se ret-posxtado eblas).

**Programado:**

Regule pluokazas en Select (B-Kelmis) cxiumonate (krom vintre kaj somere) komunan kunvenon de membroj el la tri landoj. La lasta en la (civila) jaro cxiam estas la decembra Zamenhof-festo, kiu escepte okazas dimancxe.

Krome ***Senlime*** okazigis, kiel kutime, du trilandajn renkontigxojn, la unuan en Botrange (Natur-centro), la 21-an de majo, la duan en Weisweiler (Indeno), la 17-an de septembro.

Ni aldonu al tio specialan budon en Liegxa "Salono pri studoj kaj metioj" kiu ebligis al ni prezenti esperanton (lige kun nia privilegia temo : esperanto en Neuxtrala Moresneto) al miloj da junuloj kaj lernejaj responsuloj en tute profesia kadro, kio nemankeble estis rimarkita (interalie cxar gxi okazis tuj post tiutema elsendo - tre sukcesa - de la Belgia televido).

Espereble ni estonte povos ankaux proponi tian budon en Nederlando kaj en Germanio, kie mankas membroj...

**Financoj:**

Informigxi eblas cxe Claus **Hogen**, Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@t-online.de

**Informiloj:**

Ni ne forgesu nian trimonatan informilon kaj nian ttt-ejon. Ambaux certe kontribuas al la plifirmigxo de nia Asocio. Surbaze de niaj nunaj ttt-ejoj, ni ankaux antauxvidas publikigi kompakt-diskon por komputiloj.

**Ret-disvastigxo:**

Samtiel, kiel niaj prauloj estus volintaj enkonduki esperanton en Neuxtrala Moresneto, ***Senlime*** volus disvastigi esperanton sur la reto, aparte cxe niaj sameuxregionanoj. Tial, nia ttt-ejo konstante pliampleksigxas kaj donas novajn interaktivajn eblecojn: forumo, babilejo, elektronika adreso, kurso,...

La adreson, ecx se vi ne mem disponas pri la reto, vi cxiuj devus koni kaj disvastigi:
http://www.ping.be/jmjsenlime

**Konkurso:**

Trimonatan konkurson ni volis organizi sur la reto. Sxajnas ke tio ne havos sukceson : la limdato por la unua konkurso estis la 30an de junio 2000 kaj... alvenis nenia respondo. Ni do (provizore) rezignas pri tio.

**Provizora programo**

- 10h00 gxenerala asembleo de ***Senlime*** kaj laborkunveno
- 11h00 prelego pri historio de metalurgio en Liegxo
- 12h00 Tagmangxo
- 14h00 foriro al metalurgia domego (muzeo).

**La muzeo** prezentas la historion de metalurgio, energio kaj informadiko.

En vastaj laborejoj el la 19-a jarcento, oni instalis valonan forgxon kun alt-forno je ligno el la 17-a jarcento kaj du grandegaj "maka-oj" (hidrauxlikaj marteloj) el la 18-a jarcento. Temas pri auxtenta fabrikilaro kaj transformilaro de fero. La tradicia produktaro de Liegxaj "feristoj" estas elmontrita tie-cxi : kamenaj plakoj aux "takoj", "chenets".

La salonego pri moderna siderurgia montras la nuntempan ellaboran proceson de sxtalo.

Salonego estas dedicxita al hierauxa kaj hodiauxa informadiko kaj la sinsekvaj generacioj estas tie videblaj de cxiuj, kiel la rarega tabulilo de HOLLERITH (de 1886).

Alia salonego estas dedicxita al la neferaj metaloj. Cxefrolas la zinko, kies teknologia historio estas ligita al la urbo Liège, vi povos vidi la zinkan banujon de NAPOLEONo, réaligitan 1806 de DONY, inventinto de la zinka metalurgio.

**Informoj** kaj aligxilo :
Denise DUPONT, rue de Henne 16, B-4053 EMBOURG
Tel. xx 32 (0)4/365.15.23.

Verviersa Esperanto Grupo

# *Verviersa* Angulo

**Komitato de V.E.G.:**

Prezidanto: J. Jacob
Petit Jonckeu 18
4803 POLLEUR
Tél. 087/22.10.79

Kasisto: R. Demarche
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.68.18

Sekretario: J.-M. Jacques
Place Verte 23 bte 3
4800 VERVIERS
Tél. 0486/947.957

V.E.G. dependas de la franclingva Asocio por Esperanto (A.P.E.)
M. Delforge
Rue des Glacères 16
6001 MARCINELLE

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants de l'Eurégion sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations (inchangées ! ) suivantes au compte n° 000-0245571-64 de:
Esperanto grupo
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS

**D'avance, merci à tous !**

| | |
|---|---|
| APE 2000-2001 | 400 BEF |
| UEA 2001 | 1940 BEF |
| ***Senlime*** 2001 (10 EUR) | 403 BEF |

Amis de Verviers et environs, nous avons besoin de vous... et nous savons que nous pouvons compter sur vous ! Si vous lisez ces lignes, c'est que vous avez, un jour ou l'autre, eu un contact avec notre mouvement ou notre langue. Vous connaissez donc le problème, vous nous connaissez.

L'espéranto n'est pas mort, contrairement à ce que certains disent, bien au contraire ! Il connaît, depuis quelques années, un puissant renouveau, principalement grâce à l'Internet, patrie d'adoption d'espérantistes qui y ont enfin trouvé un territoire propre.

Par centaines, des internautes, le plus souvent jeunes, se pressent aux portes de nos cours "en ligne".

Le problème linguistique est loin d'être résolu : des accidents comme celui de Pecrot sont là pour nous le rappeler. Certes il y a eu erreur humaine et manquements techniques... mais l'accident aurait malgré tout pu être évité s'il n'y avait pas eu la frontière linguistique... et l'incompréhension lors d'une conversation téléphonique entre wallon et flamand !

Et Verviers n'est qu'à quelques kilomètres des régions flamande et germanophone, et à quelques kilomètres des Pays-Bas et de l'Allemagne !

C'est pourquoi le groupe espérantiste de Verviers s'est associé avec ses voisins de Maastricht, Vaals, Aachen,... pour proposer ensemble une solution facile, démocratique et raisonnable au problème des langues.

Vous pouvez nous aider de plusieurs façons, selon vos moyens. Nous avons besoin de sympathisants actifs (des "propagandistes" bien informés et convaincus). Si vous nous lisez régulièrement, vous pouvez sans doute remplir cette fonction.

Nous avons bien entendu besoin de soutien financier. Vous êtes nombreux à l'avoir compris et à nous aider depuis des années. Nous vous en remercions encore. Si vous le voulez, c'est le moment de reproduire votre geste de générosité. Vos cotisations (pour A.P.E., ***Senlime***, U.E.A,... et éventuellement vos dons seront toujours les bienvenus...

Mais nous avons aussi besoin de membres actifs, visibles : si des centaines d'habitants de Verviers et environs ont appris l'espéranto ces dernières décennies, nous ne sommes plus que cinq ou six à participer aux réunions et rencontres en espéranto...

Si vous avez du temps libre, rejoignez-nous. Le transport n'est pas un problème, nous avons des voitures. Si vous souhaitez rafraîchir vos connaissances, les cours ne manquent pas. Contactez-nous (par écrit, par téléphone, sur Internet, aux réunions à la Calamine, aux choix...).

C'est avec plaisir que nous vous accueillerions à nouveau parmi nous et que nous chercherons pour cela les solutions qui vous conviennent le mieux.

A bientôt ?